


Hubert AGACHE urb-arkitekto

Hubert Donat Alfred Agache [Ŭber Agaŝ] estas konata kiel unu el la kunfondintoj de "*Société Française des Urbanistes*" (Franca Societo de Urb-arkitektoj) kies sekretario li fariĝis. Li naskiĝis en 1875 kaj mortis en 1959.



Li verkis kaj prelegis en diversaj landoj kaj **ankaŭ pri Esperanto**, precipe en **Brazilo**. Ne ĉiuj liaj proponoj estis akceptitaj: **Alepo**, **Bejruto**, **Damaso** kaj ekzemple, **Dunkerke** 1911, (norda franca urbo) La decido-povuloj rifuzis lian projekton, ĉar ĉi-tio postulis tro nombrajn ekspropietigojn. .

En 1912, lia plano de **Kanbero**, la ĉef-urbo de Aŭstralio, ricevis trian premion. Kaj parto de liaj planoj por tiu urbo efektiviĝis.



Bildo 1: Parta vidaĵo de Kanbero. Klare videblas preparita plano: avenuoj, parkoj, kvartaloj, ks;

[fonto: james wiseman]

La urbon li dividis en 6

kvartaloj, antaŭvidis parkojn je 20% el la tuta areo. Li ankaŭ antaŭplanis drenadon kaj kloakan reton.

En 1915, li partoprenis en rekonstruado de urboj detruitaj pro la Unua Mondmilito.



Bildo 2: Vidaĵo de urbo Albert post la mondmilito 1914/18 [fonto: commons wikimedia]

Tial, li publikigas kun du arkitektoj libron “*Comment reconstruire nos cités détruites*” = Kiel rekonstrui niajn detruitajn urbojn, kies celo estas doni metodojn al urbestroj kaj aliaj decidopovaj homoj por planizi la rekonstruadon. .

Sed, lia plej plej granda realigo (de 1927 ĝis 1932) estis la plano por plivastigo, restrukturado kaj plibeligo de **Rio de Janeiro**.

Bildo 3: Plano de Rio-de-Janeiro

Temis pri vasta projekto de pligrandigo, plibeligado kaj restrukturado.

Ĝi celis ne nur emfazi la povon kaj la monumentecan aspekton de la urbo (tiam brazila ĉef-urbo),



sed ankaŭ prizorgi ĝiajn sociajn aspektojn. Tiu laboro estas konsiderata lia plej granda realigo.

Agache komprenis la neceson kunigi kriteriojn, kiel historio, geografio, loĝantaro, beleco, kaj sociaj sciencoj. En siaj planoj, li ne miksis industriajn kaj loĝajn sektorojn.

1943, kun helpo de du el siaj lernantoj, li faris planon de **Kuritibo** (Curitiba, Brazilo) kiu estas ankoraŭ nun konsiderata kiel modelo de ekologia urb-arkitekto.

En lia tempo, Agache estis draste kritikita pro sia emo al vastaj projektoj, tro ambiciaj, kiuj ne prikonsideris la dezirojn de la loĝantoj-mem.

La scivolema leganto, kiu volas vidi per propraj okuloj mapojn de tiuj urboj: *Kanbero* kaj *Rio de Janeiro* ne hezitu serĉi ĉe Google-Maps. Ankaŭ libro aperis pri lia agado, de Catherine Bruant [katrin Brŭã] en la franca, titolita: “*Un architecte à l’école d’énergie*” = Arkitekto ĉe lernejo pri energio.

https://www.persee.fr/doc/remmm_0997-1327_1994_num_73_1_1669

Foto kaj fonto: wikipedia.org/wiki/Alfred_Agache